

# **ILEI**

## **Raporto pri ses monatoj**

**Herzberg 2013-07-15 - 2014-01-15**

### **Tri planoj**

Post sia elektiĝo kiel prezidanto Mirejo Grosjean prezentis diversajn planojn, kiujn ŝi deziras konkretigi nome de ILEI. Ili estas tri :

Reakiri statuson de NRO ĉe Unesko.

Krei vortoliston pri edukaj aferoj.

Lanĉi la trian Tutmondan Konferencon pri instruado de Esperanto.

Dum sia deĵorado ĉe UNESKO la 18an kaj 19an de novembro Mirejo povis kolekti ĉiujn dokumentojn rilatajn al nova ekpaŝo por akiro de statuso de NRO kaj paroli kun Sinjoro Patrick Gallaud, respondeculo pri la liga oficejo UNESKO-NROj. Tia kandidatiĝo devas esti aprobita de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, la venonta okazos en 2015. Do tempo estas por la preparlaboroj cele al kandidatiĝo.

Vortolisto bezonatas por edukaj aferoj, laborsemajno okazos en Les Brenets en junio 2014 kadre de kunveno de tripersona grupo.

Cele al okazigo de Tutmonda Konferenco pri instruado de Esperanto, Mirejo ekrilatis kun la registaro de la Kantono Neuchâtel, en Svislando, ĉar svisaj kantonoj fakte estas ŝtatoj. Ekrilato kun Sinjorino Maire-Hefti, edukministro de la kantono Neuchâtel, preparo de 2 dosieroj, kunveno la 4an de nov. La 28an de novembro Mirejo ricevis retmesaĝon : la registaro konsentas inviti ĉiujn ŝtatojn de la mondo tra ilia ambasadejoj en Berno aŭ misioj en Ĝenevo ĉe UN. La antaŭvidita dato estos 13a ĝis 16a de majo 2015, do dum la Montevideo Jaro, en Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds CDELI, Svislando. Laborkunsido okazos lunde la 27an de januaro en la oficejo de la kantona registaro.

### **Daŭra aktiveco por gvidi la Ligon**

Konferenco 2013 Herzberg, Germanio

Ekde sia elektiĝo Mirejo gvidis la laboron de la Komitato.

Pri la Konferenco :

106 partoprenantoj

Komitato kunvenis 4foje

Akcepto de Suda Afriko, nova sekcio

4 protokoloj aperas sur la retejo

Aprobo de ili per reta voĉdono finita je 30a de nov 2013

Decido pri aktiva subteno de la kursoj en UAM Poznan.

### **ILEI dum UK 2013 Islando**

Mirejo reprezentas ILEI-n en la Kom de UEA. Mirejo vigle pledis por la financa kontribuo de UEA favore al ILEI, kiam la Komitato de UEA volis redukti la financon kontribuon al ILEI de 6000 al 3000 EUR. Fina voĉdono diras : estu 4000 EUR

Tago de la Lernejo (prezentita de Jenifer Bishop kaj Marija Belosevic):  
salutado de 2 prez UEA kaj ILEI ; 12 prelegoj  
ILEI-Budo  
ILEI kunsido, Mirejo gvidis ĝin.

Julie-aŭguste. Estrara taskodivido. Diskuto kaj decido.

IPR 2013/3

Diversaj aspektoj de tiu laboro : enhava (ĉu aperigi, ĉu resumi, ĉu feljetonigi, ĉu rifuzi, ĉu prokrasti, ĉu amputi), lingva, korekta, politika, decida. Bonega laboro de la redaktisto Jozefo Nemeth.

3 okt 2013 : IPR 13/3 atingas Svislandon.

Sept. Juna Amiko : solvo vidiĝas. Diskuto kun Stano Marcek. Estrara decido pri tiu dungo.

Sept. Mirejo kaj Fejfi kune en Herzberg. Laborkunsidoj kune kun Zsafia Korody, do trio.

Tago de paco, 21an de septembro, mesaĝo de la prezidanto

Tago de instruistoj, 5an de oktobro, rezolucio en div lingvoj, kolekto de agadoj

Novaj reprezentantoj :

Por Slovakio, Ruslando, Tajvano

Hispanio : survoje

ALTE en nov 2013 Zsafia en Barcelono, en aprilo 2014 Mirejo en Parizo

Konkurso por amuzaj fotoj en IPR

3 okt 2013 : lanĉo

Dulingvaj varbiloj. Finpretigo de eo-en, eo-fr, eo-de

Eldono hejme 2013-11-07

Presado de po 1000 (en/eo kaj fr/eo).

2013-11-28 ili atingas Les Brenets. Stoko estas je dispono.

2013-12-14 hispanlingva teksto ricevita , en kontrolo.

Okt. Nov : Esploro pri laborkomisionoj. Kontaktoj. Renovigo, konfirmoj.

Jarfine : fino de la renovigo. La novaj laborkomisionoj aperos en IPR 2014/1 kaj aperas en la retejo.

ILEI kandidatigas ANEB por Hamdan premio de UNESCO 2013-11-07. ANEB : Landa Asocio de UEA en Burundo.

JA nova elano. Eklaboro de Stano Marcek. Nova presejo en Slovakio.

Nova aliĝilo, nova skemo por jarraporto laŭ proponoj de Fejfi. Aprobataj pere de estrara voĉdono.

Revizio de la retejo.

La prezidanto sendis diversajn salutmesaĝojn okaze de diversaj renkontiĝoj kaj kongresoj.

Preparo de IPR 2013 4 nov 2013

Lanĉo de kampanjo por 2 pliaj honoraj membroj. Zsafia Korody kaj Helmar Frank. Decido dum la 47a Konferenco 2014 en Urugvajo.

Novembre. Esploro kaj diskutoj pri la nomo de ILEI en diversaj lingvoj cele al voĉdono en Konf 2014.

Nova Kontaktpersono por Aŭstrio, Taĝikio, Luksemburgio, Portugalio.

KhK Koleg-helpa Kaso : alvoko foriras la 23an de dec. Al 9 landoj, kie membroj uzas tiun eblon.

Buĝeto sendita al la estraro por ekdiskuto : 2013-12-23

JA : Stano Marcek elektita, Buĝeto por JA ĉeestas.

Meksiko kaj Katalunio : ne plu havas 5 membrojn. Admono 2013-12-23

Kat 4, Meksiko 2

Peto pri raporto al Stefan MacGill kaj Zsafia Korody por la komenco de 2013 cele al verkado de jarraporto por ILEI por la jaro 2013.

Komence de 2014 ILEI havas piedon en 60 landoj. (Per adicio de sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj)

En 2013 entute okazis 14 estraraj voĉdonoj perretaj.

Dum la kvina Afrika Kongreso de Esperanto okazis sesio de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI UEA. 8 kandidatoj, 3 sukcesintoj.

Januare 2014 : preparo de aktuala listo de sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj por IPR 2014/1 kaj por la retejo, pro diversaj modifoj kaj aldonoj.

oo

Magdalena Fejficova « Fejfi » mastrumas la membroliston vigle kaj arde. Peto pri jarraportoj kaj membrolistoj estis senditaj en decembro. Plie ŝi aktivis en sia regiono Slovakio.

Radojica Petrovic laboras kun niaj kolegoj en Montevideo por prepari la 47an Konferencon en julio 2014. Kopioj de tiuj laboroj atingas regule la prezidanton. Oostende (Belgio) kandidatiĝas por akcepti la 48an Konferencon en 2015 antaŭ la centa UK en Lille, Francio.

Zsofia Korody kaj « Arko » la du vic-prezidantoj, trafe konsilas la prezidanton kaj subtenas ŝin efike.

Zsofia Korody en Herzberg zorgas pri la reta sendo de IPR kaj kunlaboras kun Fejfi. En septembro restadis tie Mirejo kaj triopa laboro eblis ; same okazos triopa laborkunveno fine de januaro 2014.

« Arko » agadas en Azio kun diversaj ĉinaj regionoj kaj aliaj aziaj landoj ; abunda raporto venis de ŝi.

En Usono la kasisto Vilĉjo Harris bonege kaj akurate laboras kaj konsilas.

oo

Granda danko iras al ĉiuj estraranoj de ILEI !!!

Granda danko iras al ĉiuj personoj, kiuj iel aktivis por ILEI, por IPR, por JA, ktp  
Granda danko iras al Stefan MacGill, kiu sekvas la paŝojn de la Ligo atenteme kaj helpas per diversaj labordokumentoj gvidaj.

oo

Mirejo Grosjean  
Prez de ILEI  
24an de januaro 2014